La sveda sekcio kunvenis en Gotenburgo

2005-dec

La 19:an de novembro la sveda sekcio de ILEI kunvenis en Gotenburgo.

- Sub la punkto *"Post Hirundo"* Kaisa Hansen montris provekzemplerojn de *"Språket Esperanto"*. Por la lerneja Foiro, Skolmässan en Älvsjö, 1000 ekzempleroj estis presitaj. En Gotenburgo Inga Johanson dissendos la revuojn al la bibliotekoj.
  Por la *Kantu Esperante-tago* en Språkcaféet la 19:an de decembro kaj por informo aliloke ni ankaŭ havas aron. La enhavo de la okpaĝa revuo samas kun la celoj de ILEI kaj Kaisa volas enmiksi la svedan sekcion en la revuaferon. Por la provnumero Kaisa faris preskaŭ la tutan laboron mem
- Ni ĉiuj apogas la proponon de Gustav Fridolin (de la 2:a de oktobro) al la parlamento enmeti Esperanton en la lernejojn ekde la sepa klaso kaj tra la gimnazio kiel libere elekteblan fakon. Siv S kaj Siv B jam prenis kontaktojn kun politikistoj de diversaj partioj por instigi ilin apogi la proponon
- La venonta kunsido de la sekcio estos la **18:an de februaro 11.30**, en Masthuggsliden 1, Gotenburgo
- Diversloke estas esperantaj kursoj. Kaisa faras liston pri de ni konataj kursoj dum 2005

Siv Burell

© Svenska sektionen av ILEI, http://ilei.info/svedio